

Jen klara voĉ' aŭdigas sin

VOX CLARA ECCE INTONAT



1. Jen kla - ra voĉ' aŭ - di - gas sin,
latine: Vox cla - ra ec - ce in - to - nat,



pe - ne - tras tra obs - kur' kaj nokt':
ob - scu - ra quæ - que in - cre - pat:



Nun fu - ĝu ĉi - u son - ĝo for,
pro - cul fu - gen - tur som - ni - a;



ĉar Krist' ek - bri - las de l' ĉi - el'.
ab æ - thre Chri - stus pro - mi - cat.

2. Sin levu nia febla mens'
el ĉiu lezo kaj malpur'.
Jam sin vidigas nova stel'
por montri vojon el pere'.

2. Mens iam resurgat torpida
quæ sorde exstat saucia;
sidus refulget iam novum,
ut tollat omne noxium.

3. De supre venas la Ŝafid'
por lavi niajn pekojn for.
Kun larmoj voku ĉiuj ni
petante pri indulgo Lin,

3. E sursum Agnus mittitur
laxare gratis debitum;
omnes pro indulgentia
vocem demus cum lacrimis,

4. por ke je Lia dua ven',
je l' brila kaj terura tag',
nin trafu ne la ĝusta pun',
sed Lia pia garda am'.

4. secundo ut cum fulserit
mundumque horror cinxerit,
non pro reatu puniat,
sed nos pius tunc protegat.

5. Nun estu al la Patro glor',
al Lia homiĝinta Fil'
kaj al la Sankta Dia Spir'
tra ĉiu tempo kaj eon'.

5. Summo Parenti gloria
Natoque sit victoria,
et Flamini laus debita
per sæculorum sæcula.

VOX CLARA ECCE INTONAT • M (Old 100th): Loys Bourgeois, Genève
1551 • latina T: anonima, 10-a jarcento • E: Albrecht Kronenberger 2003

Alian melodion oni povas elekti el la multegaj sam-ritmaj.